

## **RAPORTO PRI LA ELEKTA GXENERALA ASEMBLEO DE BENINA** **ORGANIZO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ BOJE**

Kiel planite, okazis en Kotonuo, cxe la sxtata bazlernejo proksime al Hotel Joca, la gxenerala asembleo de BOJE, hodiaux sabate, la 16-an de decembron 2017. Pro la fakto, ke ni jam perdis tro da tempo antaux ol komenci, la tagordo konsistis nur el unu punkto kiu jenas :

### **I- Renovigo de la Estraro de BOJE**

Ekde komence, la eliranta prezidanto de BOJE, S-ro Bernard GNANCADJA, kiu gvidis la arangxon, bonvenigis cxiujn kaj legis, al la partoprenantoj, la jam perrete diskonigitan anoncon pri la okazigo de la Asembleo. Sekve al tiu legado, S-ro Francois Hounsounou atentigis la cxeestantojn pri la fakto, ke kelkaj el la kandidatigxaj kondicxoj ne kongruas kun la Statutoj kaj Interna Reglamente de BOJE. Temis pri la punkto rilate al la agxlimo por esti membro de BOJE kaj la deviga pago de kotizo por estrarano. Koncerne la unua punkto, ni cxiuj konsentis, ke la agxlimo estas inter 18 kaj 35 jaroj. Pridiskutante la duan punkton, ni interkonsentis, ke tiuj kiuj pretas povas pagi la kotizon por esti kandidato kvankam gxi estas deviga por cxi ano. Do, kvin kandidatoj, surloke, pagis la kotizon note Bernard GNANCADJA, Athanase EKE, Norbert SADOHOUNDE, Sonade KAKPO kaj Innocent ETEKA. Post tiu debato, malfermigxis la procezo por baloti. Entute, cxeestis la eventon dudek personoj el kiuj efektive rajtis vocxdoni dek ses. Por eniri detalojn, la tri membroj de la balota komisiono note Alofa Charles, Hounsounou Francois kaj Gbadamassi Latifou agxas pli ol 35. Al ili aldonigxis partprenantino kiu estas malpli ol 18 jaroj, do ne rajtis vocxdoni laux la Statutoj de BOJE. Resume, jen la rezultoj de la baloto. Estis elektitaj estraranoj por dujara mandato :

- 1- Prezidanto : SADOHOUNDE Norbert : 09 vocxoj
- 2- Gxenerala Sekretario : EKE Athanase : 09 vocxoj
- 3- Kasisto: KAKPO Sonade: 10 vocxoj

4- Organizanto: SADOHOUNDE Joseph: 08 vocxoj

5- Respondeculo pri Informado: ETEKA Innocent: 09 vocxoj

Poste, la parolvico estis donita al la novelektitaj estraranoj kiuj dankis cxiujn kaj esprimis sian gxojon.

Por fini, ne mankis la konsiloj de la membroj de la elekta komisiono kaj tiuj de la eliranta prezidanto. Notindas, ke S-ro Alofa Charles ankorauxfoje insistis pri la neceso pagi kotizon por la financa memstarigxo de la Organizo.

La arangxo komencis cxirkaux la dekunua kaj finigxis je la dektria.

Verkis,

Latifou, protokolanto.